

# LA ETULO

MONATA GAZETO ILUSTRITA POR GEKNABOJ

JARABONPREZO : 10 fr. fk. aŭ samvalora monsumo

21, Rue de Rocroy — PARIS-X<sup>e</sup>



RIPOZO POST LUDO



## Bileto de la Onklo

KARAJ GENEVOJ,

Post labora lernjaro, jen la libertempoj tiel arde de vi deziritaj! Kun vi mi tute ĝojas pro tiu feliĉa epoko de via juna vivo. Kia plezuro vi havos trakurante la kamparon kaj arbaron kun viaj etulaj amikoj. Kiaj viglaj ludoj sane lacigos vian korpon. Tial mi tutkore bondeziras al vi gajigajn libertempojn. Profitu la okazon por brue ludi. Je via aĝo oni bezonas iomete bruigi, ĉu ne? Malfeliĉe kelkafoje la gepatroj ne tion komprenas. Sed mi, via maljuna onklo, tute komprenas viajn bezonojn. Tial mi rediras al vi: brue ludu!

Sed ludu ĉiam ĝentile, honeste, bone. Ne turmentu la bestojn, ĉu hundon, ĉu katon, ĉu precipe birdon. Ne estu kiel malbonaj knaboj, kiuj ĉiam suferigas iun aŭ ion. Ilia amuzo estas detruo. Male, dum viaj libertempoj, vi konstruos. Kaj kion? Ho! estas multoj konstruotaj, kaj ne estas necese, ke mi detalu al vi la multajn objektojn, kiujn vi kapablas konstrui por via distrado kaj samtempe por via instruado. Tamen lasu min sciigi al vi konstruadon, al kies elstarigo vi povas kunlabori. Tiu estas... nia organo. Mi diras «nia», ĉar vere *La Etulo* estas «via» kaj «mia» organo, kaj sekve la «nia», ĉu ne, ĉar ni estas samfamilianoj. Do mi petas la kunlaboradon de vi ĉiuj, karaj genevoj, por la kreskigo de nia organo. Kiam oni deziras pligrandigi domon, oni alportas ŝtonojn, kiujn poste oni disponigas. Por gazeto, same okazas. Oni devas alporti ŝtonojn, tio estas abonojn. Kaj ju pli estas alportitaj abonoj, des pli povas grandiĝi la gazeto. Havigu do al nia organo multajn novajn abonojn. Montru vian gazeton al viaj amikoj kaj instigu ilin aboni *La Etulo*'n. Vi mem

profitos, ĉar se estas multaj abonantoj, la gazeto fariĝos pli belaspekta, pli ampleksa. Cetere por vin helpi, la administracio decidis sendi al ĉiuj nunaj abonantoj du ekzemplerojn de tiu ĉi numero, por ke vi disponigu la duan kaj donu al unu el viaj esperantistaj amiketoj. Ne forgesu tion!

Nia gazeto ne eliros en septembro. Sed de oktobro ni komencos paroli al vi pri granda kaj interesa konkurso, kies gajnintoj ricevos belajn premiojn, kiuj certe kompensos la malmultekostan abonprezon.

Akceptu la bondezirojn de via amema

ONKLO BOB.



## Katineto

Antaŭ la dometo  
nigra katineto  
sin purigas,  
plibeligas;  
lerte movas sin langeto,  
brave helpas piedeto.



Ŝi montras,  
instruadas:  
« Estu tia,  
kara mia!  
Se vi ŝatas la belecon,  
amu ĉiam la purecon! »

*Originale verkis:*  
FRANJO MODRIJAN.



Dum la tuta monato Aŭgusto kaj komence de Septembro, neniu estos en la oficejo de « LA ETULO ». Sekve, bonvolu ne skribi dum tiu tempo, ĉar vi certe ne ricevus respondon.



# Noni kaj Mani

VERA HISTORIO EL MIA JUNECO

DE JOHANO SVENSSON, S. J.

Tradukita de J. KONDUKANTO

(*Dairigo.*)

## IV-a ĈAPITRO

### En granda danĝero

Dum ni estis tiel ludantaj kaj rigardadis al la akvo, ni, malfeliĉaj knaboj, tute ne rimarkis, ke la ĉielo jam de longe estis kovrita de nuboj, ke la vetero estis fariĝinta iom malseka kaj malvarma, ke la griza nebulo, kiu estis leviĝinta inter ni kaj la tero, fariĝis daŭre pli kaj pli densa kaj envolvis ĉion en nepetrebblan teruran duonmallumon. Kaj

plej malbone estis: ni ne rimarkis, ke la forfluo komenciĝis, kaj ke forta fluo ekkaptis nian boaton kaj transportis ĝin preter la landpinton *Oddeyri*. Ni estis kun furioza rapideco veturantaj al la plena maro! Mani estis la unua kiu rimarkis la danĝeron.

— Noni! li subite ekkriis, kio okazas? mi ne vidas plu teron.

— Kio! ĉu vi ne vidas plu teron? mi terurigita respondis, kaj ĉirkaŭrigardis ĉiuflanken. Kaj vere, mi nenion



Ĝoja foriro por la libertempoj en la familio.

vidis krom nebulo, netravedebla griza nebulo.

— Ho Dio! mi ekkriis; en tiu okazo ni estas perditaj!

Mi ĵetis mian fluton en la boaton, kaj ekkaptis en malespera timego la remilojn.

— Mani, direktu rekten al la urbo.

Li saltis senprokraste al sia loko, sed rigardis min per demandaj okuloj kaj diris:

— Sed ja, en kiu direkto estas la urbo?

Mi ne scias, kien mi devas direkti. Mi ankoraŭ ĉirkaŭrigardis iom, por scii kiun direkton ni devos iri. Vane. Mi neniel povis imagi, kie estas la Sudo aŭ la Nordo, la Oriento aŭ la Okcidento. Mi pripensis iom, kaj estis baldaŭ konvinkita, ke la forfluo jam estis tiel malproksimen kondukinta nin al la maro, ke ni nek oriente nek okcidente trovus ebanan sablo-marbordon, sed rokojn, kiuj vertikale supreniras el la akvo.

Estis do neeble por ni alboridiĝi, eĉ kiam ni sukcesus atingi la marbordon. Kion mi komencu! malproksime al la Sudo estis la urbo. Senĉese ni foriris pli malproksimen de tie kaj rapide, tre rapide. Ni estis vere en tre granda danĝero. Mani sidis je la direktilo kaj plorante li rigardis min. Mi ja diru, kion ni faru. Fine mi diris:

— Mani, ĉu vi tute ne povas diveni, kie estas la Sudo?

Li rigardis dekstren, tiam maldekstren kaj pripensis iomete. Fine li skuis la kapon kaj diris:

— Mi neeble povas trovi ĝin, Noni.

— Do Dio devas helpi nin, ĉar mi ankaŭ ne scias, kie ĝi estas.

Dum iom da tempo, ni sidis tie kaj silentaj fikse rigardantaj en la nepenetreblan nebulon, kiu fariĝis pli kaj pli densa. Tiam mi manprenis ree la remilojn kaj diris:

— Mi faros almenaŭ tion, kion mi povas fari kaj antaŭenremos trafe, maltrafe.

Iom da tempo mi laboris fortege. La

boato glitis rapide sur la kvieta glata akvospegulo. Sed kien ni iris? Pri tio ni nenion sciis. Ĉu ni veturis al la rokoj en la okcidento aŭ en la oriento? Aŭ ĉu mi remis kontraŭ la fluo, al la urbo? Sed en la lasta okazo ni restis certe en la sama loko, ĉar la forto de la fluo estis tiel granda, ke mi neniel povis venki ĝin. Aŭ ĉu mi remis eble norden? Sed en tiu okazo ni veturis rekte kun la fluo kiu antaŭen puŝis nin, kaj tiam mi helpis rapidigi nian pereon. Tiu pensajoj estis fine kaŭzo, ke miaj fortoj kvazaŭ paralizigis. Mi entiris ree la remilojn, levis min kaj eksidis flanke de Mani. Dum kelka tempo ni sidis unu flanke de alia. Tiam diris Mani:

— Kial vi ne plu remas?

— Tial ke tio ja ne profitos; mi ne scias kien mi remos, kaj vi ne pli scias. Mani silentis.

— Estas ja terure! li diris post paŭzo.

— Vi estas prava: estas terure, mi respondis.

Ni sidis senmovaj kaj rigardis silente al la fiŝoj, kiuj kuŝis en nia boato. Post paŭzo Mani ekrigardis min. Liaj okuloj estis plenaj je larmoj.

— Kompatinda Mani! mi diris kaj premis dolĉe ambaŭ liajn manojn. Mi sentis ke li havas malvarmon.


— Sed vi estas malvarma, kara Mani. Viaj manoj estas tiel malvarmaj kaj vi aspektas tiel pala! Ĉu vi ne estas bonfarta?

— Ho, ne estas tiel grave, Noni. Sed mi havas tamen malvarmon.

— Kompatinda frateto, kiom mi bedaŭras, ke mi ne povas helpi vin!

— Baldaŭ ja pliboniĝos, Noni.

Mi pripensis: ho ve, ne estos; estas ankoraŭ nur la komenco de nia sufero. Sed mi gardis min, laŭte diri tion. Fariĝis daŭre pli malbone pro la malsekeco kaj la malvarmeco, kaj plie falis stranga mallumo. Ĉu jam estis nokto, aŭ ĉu nur nebulo fariĝis pli densa? Ni ne sciis, ĉar ni ne havis ideon pri la horo. Mi alprenis Mani'on al mi, por havigi al li ion da varmeco. Mi ja tiom



Dresitaj simioj imitaĉas homojn.

amis mian frateton kaj mi ne povis vidi lin suferanta. Li kuŝigis sian kapon sur mian bruston, kaj fermis la okulojn. Mi rigardis al li... ho, li ne resaniĝis. Lia vizaĝo, alitempe radianta pro saneco, pli kaj pli paliĝis. Kiel mi riproĉis al mi mian senantaŭzorgon! Mi sola estis kulpa pri lia sufero. Fine li levis la okulojn kaj demandis:

— Ĉu vi ankoraŭ ne povas vidi teron?

— Ho ne; ni nur antaŭen glitas ĉiam al la maro.

Tiam li diris:

— Ho! kiel malvarme estas! Mi volonte dormus iom, sed mi ne povas komenci pro la malvarmo.

Ĉiu el liaj vortoj tranĉis min tra la koro. Sed kion mi povis fari? Mi ne posedis kovrilon por envolvi la malgrandulon. Tiam mi pensis pri la kuketoj kaj la sekvinberoj kiujn ni havis en niaj poŝoj. Tiuj eble povus helpi: se ne kontraŭ la malvarmo, tiam ja

kontraŭ la malsato. Tial mi demandis al Mani:

— Ĉu vi ne malsatas?

— Jes, sed mi suferas ankoraŭ pli pro la malvarmo.

Mi proponis al li manĝi da niaj kuketoj kaj sekvinberoj. Mani volontege akceptis la proponon, kaj ni formaniĝis preskaŭ tutan nian provizaĵon. Tio helpis iomete; ni sentis nin iom refreŝigitaj kaj refortigitaj. Sed la malvarmo daŭris. Ankaŭ mi ege sentis ĝin. Mi refoje tuŝis la manojn de Mani. Ili estis malvarmegaj kaj lia vizaĝo estis tiel pala kiel tiu de mortinto. Mi terurigiĝis. Mi devis helpi lin. Tiam min kaptis feliĉa ideo. Mi portis sufiĉe varman jaketon. Tuj mi leviĝis kaj demetis ĝin.

— Mani, mi diris, venu, mi helpos vin surmeti mian jakon.

— Ne, Noni, ne faru tion, alie vi mem fariĝos malsana.

— Pri tio vi ne devas timi. Mi estas



multe pli aĝa ol vi, kaj povas do pli suferi. Jen surmetu ĝin rapide.

— Tamen mi ne kredas, Noni, ke vi povos suferi tian malvarmecon sidante sen jaketo. Do, ne demetu ĝin.

— Kio! ĉu mi ne povos suferi tion? Ĉu do vi ne scias plu de pasinta jaro, kiam mi estis kuŝanta kelkajn horojn sub la neĝo sur la vojo de *Akureyri* al *Hals*? Tio tamen estis ankoraŭ multe pli malbona ol nun.

— Jes, sed vi tamen malsaniĝis tiam.

— Jes, sed mi bezonis nur unu nokt-on por resaniĝi. La sekvantan tagon mi ree estis tute sana.

Fine Mani konsentis. Mi surmetis mian jaketon sur lian maldikan bluzon kaj bone butonumis ĝin. Poste ni rekaŭris sur la benko ĉe la direktilo kaj eksidis tuj unu flanke de alia. Ni provis dormi kaj kuŝis tie kun fermitaj okuloj. Post iom da tempo mi rigardis iam al la malgrandulo. Ŝajnis ke li aspektas iom pli bone. La varma jaketo certe faris al li bonon. Tio kontentigis min tiel ke mi preskaŭ forgesis kiel malvarma mi mem estas.

Kvankam Mani ankoraŭ kuŝis tie kun fermitaj okuloj, li ŝajnis tamen nedormanta.

— Ĉu vi dormis? mi demandis per mallaŭta voĉo.

Li malfermis la okulojn kaj kapsignis nee.

Tiam li eksidis rekte kaj diris :

— Ĉu vi scias, kion mi ĵus pensis?

— Ne; kion do?

— Se ni ne povas dormi, tiam estas kaŭzo, mi kredas, ke ni ne faris nian vesperpreĝon. Nia patrino diras, ke oni multe pli rapide kaj pli kviete dormos, se oni estas preĝinta. Ĉu ni faru do unue, Noni?

— Jes, ni preĝos kune.

Ni genufleksis kaj unue preĝis, ĉiu aparte, la vesperpreĝon, kiun ni kutime faris hejme, antaŭ ol enlitiĝi. Kiam ni estis pretaj, mi petis Mani'on deklami kelkajn el la belaj poemetoj, kiujn ni lernis en la lasta tempo de nia patrino

kaj kiujn mi ne plu bone sciis parkere. Subite li kunmetis siajn manojn kaj deklamis la jenan Islandan preĝeton, kiu tradukite Esperantlingve, tekstas jene :

Ho, Jesuo mia,  
Estu Mano via  
Lito de ripozo mia.  
L' alia Mano kovru min,  
Infanamiko, el la kor'  
Neniam mi vin pelu for.  
Kaj kiam estos mi mortanta,  
Vi estu en la Man' prenanta  
Animon mian kaj portanta  
Al Paradizo radiantan.

★

Ho Jesuo mia,  
Ke anĝelo via  
Gardu ĉe la lito mia;  
Li ŝirmu kontraŭ pekoj min  
Por ke mi ĉiam amu vin.  
Danĝer' neniam trafos min  
Se se gardanĝel' protektas min.

Ni finis nian preĝon per « Patro Nia ». Poste ni eksidis ree unu flanke de alia kaj ĉirkaŭbrakis nin.

— Ĉu vi ne pensas, ke nun pliboniĝos? demandis Mani.

— Jes, mi opinias, jes.

— Kaj ĉu vi ne kredas, ke Dio ankaŭ elaŭdos nin?

— Certe, Mani.

— Nia patrino diras ja, aldonis Mani, ke Dio ĉiam elaŭdas nin, kiam ni preĝas atente kaj konfide. Kaj tion ni faris, ĉu ne? Nun ni ne devas timi plu, Noni! Dio kaj Liaj Anĝeloj estas nun ĉe ni.

Kvankam tiaj infanaj vortoj de mia frateto estis kutimaj por mi, nun tamen ili impresis min tiel, ke larmoj fluis sur miajn vangojn.

Mani diris ankoraŭ :

— Jen, Noni. Nun ni povas rekuŝigi, ni certe dormos. Dio certe savos nin el tiu ĉi danĝero.

Anstataŭ respondi, mi premis lin kor-tuŝite sur mian koron. Mi sentis ke Dio parolis per lia buŝo, ĉar mi estis konvikita, ke lia animo estis multe pli proksima al Nia kara Sinjoro ol mia. Mia frateto estis vere virta, senkulpa

knabo, kaj tial amata kaj estimata de ĉiuj, kiuj konis lin intime. Tie ĉi li estis por mi vera gardaĝelo, ĉar al li mi devis danki, ke ni plenumis nian preĝon, kaj liaj infanaj vortoj ŝanĝis mian senkuraĝecon en konfidon.

Ni ree ekkuŝis unu flanke de alia, kaj efektive ekdormegis.

Tiel ni jene kuŝis, kovritaj per la nebulo. Protektataj de la bonaj Anĝeloj, ni ripozis sen zorgo sur la profunda akvo en la malforta boato, kiu veturis el la granda *Eja*-fjordo al la maro.

(*Daŭrigota.*)

## FABELOJ

Originalaĵo de FRANJO MODRIJAN

(*Daŭrigo.*)

### VIII. — *La bela princo.*

Estis iam bela princo — la fabelo komenciĝis kiel vera teatraĵo.

Li pripensadis ĉiam nur pri la morto, pri la tempo, kiam li kuŝos en la tombo, dum la aliaj homoj paŝados sur la mondo, kiel li nun. La suno brilos, kiel hodiaŭ, kiel hieraŭ, kiel antaŭ miljaroj.

«Jes, kiel malgrandaj kaj mallongvivaj ni estas kompare kun ĝi, kiu ek-lumiĝas kaj varmigas la teron! Komparate kun la eterneco, nia vivo estas nur unu guto en la maro. Ĉia vivo ĉi tie pasas, nur la mondo kaj la suno staras ĉiam neŝanĝeblaj!» ĝemetparolis lia koro.

Rajdante tra la kampoj, li iutage ekvidis antaŭ si florantan, serenaspectan knabinon. Li ekremiĝis, surprizita kaj ektimigita.

— Kara princo, ĉu vi serĉas fabelon?

— Jes, bela diino! Nia mallonga vivo ne plaĉas al mi!

— Jen la odoranta, vekiganta naturo, la printempa juneco kaj beleco, la dia poezio, la sankta mistero de la eterna

mondfabelo! Ĉu vi ne vidas, ne aŭdas ĝin? Ĉiu vivo, ĉiu estaĵo estas po unu rakonto. Rigardu naturon kaj vi vidos kaj aŭdos fabelojn!

### ETULA NAIVECO

En zoologia ĝardeno, knabinego provis karesi beletan papagon.

— Ne tuŝu ĝin, diris iu: ĝi pinĉos vin.

— Kial do?

— Nu, ĉar ĝi ne konas vin.

— Tial diru, ke mia nomo estas Sonjo.

★

### ĜUSTA KALKULO

— El 6 deprenu 3, kion restas?

— Mi ne scias.

— Atentu: vi havas 6 pomojn, mi postulas 3; kiom restas al vi?

— Restas 6.

— Ne, ĉar mi petis 3.

— Sed mi ne donas ilin.



La Japana knabino  
tutkore ridetas al vi.

SURSTRATA DRAMO (Senvorta rakonto)

